

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (882) • 2010 •

***PER MALFERMITAJ PORDOJ
BEREGDARÓC ATENDAS VIN***

Preĝeja enirejo en Beregdaróc.
Fotis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021;

✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,

CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio

☎ +420 325 615 651; ✉ cea.polnický@quick.cz

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,

DE 74074 Heilbronn, Germanio

☎ +49 7131 162688;

✉ siegfriedkrueger@arcor.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,-

• Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante
rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- •
Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al
la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-
poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi
al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda
poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132.

Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI -
BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;

☎ +46 (70) 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

ENHAVO

Ĉu infanlaboro estas malbono neevitebla	51
Mi estas profunde ŝokita	52
Ĉu Esperanto floras en Afriko	55
Philipp Melanchthon	56
Du grandaj bibliaj tradukprojektoj realiĝis	58
Letero al la redaktoro	59
Informo pri Beregdaróc	60
La tri vivodemandoj	62
Ŝercoj kolektitaj	63
Sekretaria jarraporto	64
Financaj raportoj	66
La KELI-insigno	70
Nekrologoj	71
Patrina Dio	72

REDAKTORAJ VORTOJ

Baldaŭ estas vorto ofte uzata de mi kaj
mia edzino, ĉar ni de tempo al tempo
loĝas aparte pro laboraj kaŭzoj. *Baldaŭ*
estas vorto kiu ankaŭ taŭgas kiam ni
nun preparas nin por la kutimaj ren-
kontiĝoj okazantaj somere. Precipe mi
pensas pri nia KELI-kongreso en
Beregdaróc. Estas ĉiama ĝojo denove
renkonti konatulojn kaj ankaŭ ekkoni
kelkajn novajn personojn. Kaj mi estas
inter tiuj kiuj havas eblecon partopreni.
Baldaŭ!

Kio estus la redaktoraĵoj sen mia
konstanta peto pri kontribuadoj? Kvan-
kam la nuna numero pleniĝis per
alvenintaj tekstoj, la varieco de fontoj
povus esti pli granda. Ne hezitu – al iu
sekvonta numero vi raportu pri viaj
someraj travivaĵoj!

Ĝis baldaŭ en Esperantio!

Ĉu infanlaboro estas malbono neevitebla?

Jacques TUINDER, NL

La 12-a de junio estas la Internacia Tago kontraŭ Infanlaboro. Mondvaste laboras, sub pezaj cirkonstancoj, pli ol 240 milionoj da infanoj malpli ol 18-jaraĝaj. Por multaj humancelaj organizaĵoj tio estas esenca temo. Sed ekzistas ankaŭ homoj, kiuj demandas al si: ĉu gravas tio ke (kun)laboras infanoj? Ĉu ne estas malbono neevitebla pro la severa malriĉeco en la familio de tiuj infanoj? Kion oni povas fari ĉi-kampe? Kaj kie kaj kiel komenci?

Mi havis nur naŭ jarojn

“Mi havis naŭ jarojn, kiam onklino el Limao vizitis miajn gepatrojn”, rakontas la nun 20-jara Marlena. “Mi loĝis kune kun miaj gepatroj kaj dek unu gefratoj en vilaĝeto en Andes-montaro de Peruo. Ŝi proponis al miaj gepatroj, ke mi venu al ŝi por labori kaj samtempe frekventi lernejon en Limao.”

Konsentis ŝiaj gepatroj, kaj nur sep jarojn poste Marlena reiris al sia familio. Dum tiu periodo iu 'bapto-onklino', malproksima parenco, devigis ŝin al ĉiaj laboroj en la domo: kuiri, lavi, purigi. Surstrate ŝi devis vendi uzitajn vestaĵojn por la onklino. En aliaj horoj ŝi devis servi al aĉetantoj en ŝia malgranda vendejo. Kiam ŝi faris erarojn, la onklino insulte nomis ŝin indianino, bastonis ŝin kaj enŝlosis ŝin sen manĝaĵoj. Certe, la onklino, kiu ne kapablis legi, skribi aŭ kalkuli, permesis al ŝi iri al lernejo, ĉar

avantaĝo estis, ke Marlena tion povis fari por ŝi. Kiam post du jaroj ŝia patro venis vizite, ŝi ne kuraĝis konfesi al li, kiom malbona estas ŝia vivosorto, ĉar kiel bona filino ŝi evitis lin seniluziigi. Nur post sep jaroj venis al ŝi ŝia pli aĝa fratino, al kiu ŝi petegis: forkonduku min hejmen al la familio!

Kiam ŝi faris erarojn, la onklino insulte nomis ŝin indianino, bastonis ŝin kaj enŝlosis ŝin sen manĝaĵoj.

Antaŭ nelonge oni ĝenerale ne konsideris mastruman deĵoron, kian faris Marlena, grava formo de infanlaboro. Oni simple diris, ke tio estas bona kaj taŭga maniero por knabinoj prepari sin por estonteco kiel mastrumantino kaj patrino. Krome ofte temas pri knabinoj, loĝantaj en kamparo, kiuj migras al la urbo kie prezentiĝas la eblo frekventi lernejon. Sed laŭ esploro, kiun faris ILO, la Internacia Organizo por Laboro de UN en 2004, montriĝis ke sen la plej minimuma dubo temas pri unu el la plej gravaj formoj de infanlaboro. Granda beno estas, ke ekzistas organizaĵoj, ĉikaze en Peruo, kiuj helpoprograme akompanas ĉi tiujn junajn servistinojn

kaj aliajn laborantajn infanojn, kaj kiuj – nelaste – informas ilin pri iliaj rajtoj. Kiam leviĝas problemoj kun laboradonantoj, ili povas ricevi juran asiston.

Redukti infanlaboron

Nenio estas pli bona ol serĉi vojojn por elmondigi infanlaboron. Necesas informado. Necesas dialogo. Finfine ĉiu devas scii, ke infanlaboro havas negativajn sekvojn por ilia evoluo, kiuj ludados rolon ankaŭ en la jaroj de plenkreskeco. Rekomendindas klare priskribi la problemaron por pli efike serĉi solvojn (kio estas la kaŭzoj? kiel oni povas preventi?). Kial naŭjaraj infanoj faras mastruman laboron aŭ kvinjaraj faras negocon sur la vendoplaco? Ĉu pro ekonomiaj aŭ aliaj kialoj? Ĉu infanoj serĉas surstratan vivon por forkuri de enhejmaj problemoj? Ĉu opinias la gepatroj ke ilia filino tiel havos la ŝancon sekvi instruon? Ĉu eble mankas ludaj,

sportaj, kulturaj, rekreaj kaj aliaj ebloj por infanoj?

Certe, instruado estas la plej grava armilo en la batalo kontraŭ infanlaboro kaj estonteco en mizero! Alian helpon ofertas faklernejoj. Sed ĉiam necesas mono: kiel plibonigi la financon situacion de la gepatroj?

Infanoj en lernejo, gepatroj en laboro

Nu, Marlena finfine saviĝis. Troviĝis por ŝi bona solvo. La pasintan jaron ŝi diplomiĝis en mezlernejo kaj poste ŝi komencis sekvi kurson por beligistino. Ankoraŭ ĉiam ŝi faras modestan impreson kaj parolas mallaŭte. Sed ŝi havas klarajn ideojn pri sia estonteco. Ŝi nun ree laboras kiel mastruma asistantino, sed loĝas hejme kaj mem pagas la kostojn de la kurso. Marlena trovos sian vojon en la vivo, sed kiom da infanoj ankoraŭ atendas?

☞



Mi estas profunde ŝokita!

Jacques TUINDER, NL

Neniu ne scias, ke la katolikan eklezion nune skurĝas terura krizo. Kaj tio en pluraj landoj, nelaste en mia. Mi parolas pri seksa kaj perforta misuzado de infanoj. De Afrika

verkisto mi aŭdis, ke li kaj multaj aliaj grandan dankon ŝuldas al eksterlandaj misiistoj, kiuj predikis bonan, esperigan mesaĝon de liberigo, fondis lernejojn, konstruis hospitalojn kaj tiel esence

kontribuis al la evoluo de ilia lando. “*Sed min tertreme ŝokis*”, li aldone diris, “*kiam oni rakontis al mi, ke Irlanda episkopo en la pasinteco intence sendis pastrojn, kiuj estis misuzintaj infanojn, al mia lando por tiel malhelpi novajn mispaŝojn (en Irlando)...*” Nu, tio profunde ŝokis ankaŭ min!

Antaŭ nelonge belga episkopo faris

Multe da homoj evidente
dubas pri tio, ĉu homo
gastigu kunhomon, kiu
pekfalis kaj psike vundis
infanojn.

publikan konfeson kaj pro tio tuj forlasis sian oficon. Kien, tamen, subite maldungita eklezia altrangulo sin direktu? Mi legis ke li decidis sin fortiri en abatejon, kiu donis al li sekuran tegmenton por pripensado kaj pentofarado. Sed jam rapide akraj, indignaj voĉoj el la publiko komencis krei kaj kondamni. Ili riproĉas al la abato ke li malfermis antaŭ tiu episkopo sian pardonon. Nu, ankaŭ la kruela, nehumana, nekristana reago de 'la publiko' min ŝokis. Mi demandis al mi ĉu tiuj 'protestantaj' homoj ne kapablas iom kompreni, ke tute ne estis facila paŝo por tiu monaĥejo. Tamen, ĉu fakte ne temas pri pure evangelia devo, kvankam *devo* ĉi tie ne estas la ĝusta vorto? Ĉu ne ĉiu homo havas ankaŭ la rajton denove komenci, plibonigi malbonon

en la pasinta vivo okazintan? Multe da homoj evidente dubas pri tio, ĉu homo gastigu kunhomon, kiu pekfalis kaj psike vundis infanojn. 'La mondo' pensas, ke la gastiganto de tia persono celas senkulpigon por misfaro kaj misfarinto.

Multaj homoj miasperte ne komprenas, ke nenio tiel kaj tiom konfrontas kiel la absoluta silento de loko, konstruita por preĝado kaj kontemplado, por meditado kaj pekokonfeso. Ejo, destinita unualoke por virinoj kaj viroj kiuj serioze, konsciencie kaj konsekvence serĉadas Dion kaj la proksimulon. Ĉu estas malfacile pripensi, ke ĉe la monaĥeja pordo la abato renkontis fraton en granda mizero, kiu sekve urĝe komprenon kaj helpon bezonis? Ĉu oni nur laste komputu lin kaj nepre – 'repagante'?! – faru lin nova viktimo? Ĉu oni do devas eliri el tio, ke homo profunde falinta savu sin mem el mizero, honto kaj kulpo? Ĉu 'la mondo' vere opinias ke tiu kiu kompatas tian kompatindulon intencas forkaŝi, fornei lian kulpon? Nu, bone komprenu ĉiu, ke sur la blankaj, spegul-efektaj muroj de monaĥa ĉelo la homaj pekoj kaj mispaŝoj ade aperas kaj reaperas per kapitalaj, kriegantaj literoj!

Monaĥejoj – mi mem, jam ekde 1994, du tagojn en la semajno volontule deĵoras en nederlanda abatejo – ne estas hejmoj de blinda kompatemo kaj senkondiĉa pardonado. Ne regas tie laŭregula silentado por *prisilenti* malbonajn aferojn. La silentado, male, havas laŭtegan voĉon kaj ĵetas niajn malbonaĵojn rekte antaŭ niajn piedojn.

En la soleco kaj forlasiteco de la ĉelo la ploranta vizaĝo de la viktimo daŭre ĉeestas. Ĝi tiras per pikantaj okuloj la kulposenton el la orbitoj ĝis per larmotorentoj da mizero ĝi fluas super la vanĝoj.

La preĝado en monaĥejo tute
ne estas afero de dolĉa
sukero kaj abela mielo, sed
rekta kaj mordanta renkontiĝo
kun la vivanta vero kaj la
viviganta Vero!

La kulposento ne povas trovi en tia ĉelo sekretajn pordetojn, malantaŭ kiuj ĝi povas kaŝi sin mem en la forgesoŝrankon. Ankaŭ la traboj, kiujn la kulpulo klopodis stapli en la kapo por apartigi sian bonan de sia malbona flanko, estas forigataj, unu post la alia. La spegulo de la animo havas plenkambran larĝon kaj pendas sur ĉiu muro. Neniu povas malaperigi sin aŭ forkuri de si mem en monaĥejo.

Abatejo povas esti azilo por forpelitoj, sed neniam tute sendanĝera rifuĝejo, kie oni povas kaŝi sin por publika tribunalo aŭ por la propra konscienco. La Sinjoro, kiu estas La Supera Amo en psalmoj, kiujn monaĥoj ĉiutage recitadas, rolas ankaŭ kiel senpartie Justa Juĝisto! La preĝado en monaĥejo tute ne estas afero de dolĉa sukero kaj abela mielo, sed rekta kaj

mordanta renkontiĝo kun la vivanta vero kaj la viviganta Vero! Ĉiu kantata Haleluja havas kiel eĥon, kiel refrenan antistrofon, la psalmon "*el profundo de mizero mi vokas al Vi!*"

En abateja kapelo nek monaĥo nek kiu ajn povas forigi sin, rampi malantaŭ pilieron, fariĝi nevidebla antaŭ Dio kaj niaj kunhomoj. Kredo kaj nekredo, kiuj en ĉiu homa koro interbatalas, senĉese renkontiĝas, kiel matene la taglumo de el altaj pintfenestroj senkolora falas internen kaj miksiĝas kun la mallumo de la pasinta nokto, ankoraŭ nebule ŝvebanta en la spaco.

Kiu ĉi tie klinas la kapon, ekhavas tujan kaj fortan kontakton kun siaj sekretoj, kun la vundoj de sia animo kaj kun la traŭmatoj, per kiuj li grave vundis aliajn. Konklude, monaĥejo estas perfekta, resaniga loko por homo kun profunda kulpo kaj pro tio varme frapantan koron sopiranta. Dio ĉiam estas pli granda ol kiu ajn malbono aŭ kulpo. Finfine ebligu kaj naskiĝu pardono kaj graco, kompatoj kaj repaciĝo.

Kaj la 'devo' de la mondo-ekster-labatejo? Jes, ĝi estas iusence alia. Por ĝi konvenas unualoke specialaj kategorioj kiel justeco kaj kondamno, repago kaj puno. Sed estas tute klare ke ĉiu kulpulo, ankaŭ eklezia altrangulo aŭ pastro, devas publike respondeci pri si kaj pri siaj misaj agoj antaŭ tribunalo. Sendube provizore en abatejo kaŝiĝanta episkopo ne estos escepto, do same devos siatempe aperi antaŭ juĝejo!

☪

Ĉu Esperanto floras en Afriko?

Åke AHLRÉN, SE

Sub tiu rubriko aperis en la UEA-revuo ESPERANTO marto 2004 artikolo pri kvar E-kluboj en Afriko. Unu el tiuj kvar, la Virunga Esperanto-Klubo, Rutshuru, eĉ ne havis ret-adreson. Tiam ankaŭ mi ne havis tian kaj sendis saluton per 'limak-ira' poŝto al indikita adreso en ĉelima urbo en Ugando, ĉar en D.R.Kongo, la hejmlando, normala poŝto ne funkciis.

Tio estis la komenco de pli ol 6-jara kontakto kun la klubo, pere de ĝia gvidanto NTAWU Hubert. Responde li i.a. skribas:

”Kara samideano, ni havas multajn projektojn kiuj malsukcesas pro manko de monrimedoj. Vere niaj grupoj estas malriĉaj finance sed ni havas riĉajn ideojn kiuj necesas eksterajn subtenojn.”

Sed li finas la leteron per *Post scriptum*:

”N.B. Rutshuru estas urbeto oriente de Demokrata Respubliko Kongo.



Virungaj montoj: Gahinga (maldekstre) kaj Muhabura (dekstre)

La milito finiĝis en tiu parto sed la malsekureco daŭras ankoraŭ en vilaĝoj ĉar homoj perdas siajn vivojn, virinoj estas seksperfortigataj ĉiutage... Ke la Ĉiopova vin benu.”

Do, tio instigis min daŭrigi la kontakton kun frato Hubert, sendante €-monbileton (euro) kun miaj leteroj. La malsekureco ne ĉesis, sed pli trankvilajn periodojn sekvis vera terurado. Hubert jam havis e-poŝt-adreson kvankam ne privatan komputilon kaj postan jaron mi havigis al mi tian. Kiam jam ne eblis uzi la normalan leterpoŝton ni daŭrigis per internet kaj mi sendis monon pere de Western Union.

Mi havas dosieron kun nia korespondado, sed mia nuntempa korpa forto kapablas nur redoni la esencon: La homoj de tiu plej orienta parto de DR Kongo vivas sub konstanta minaco de malamikaj atakoj. Tamen la Virunga klubo sub gvido de la lerta kaj klera NTAWU Hubert (48) pligrandiĝis dum la jaroj. Li havas gravan signifon por la florado de Esperanto en sia regiono. Kontakti lin sub la ret-adreso: hubntaw@yahoo.fr por detaloj pri la aktuala situacio.

∞

Philipp Melanchthon/ Filipino Melanktono

Instruitulo kaj politikisto, 450a datreveno
de la morto je 19a de aprilo 1560

Siegfried KRÜGER, DE

Filipo Melanktono (laŭnaske Philipp Schwartzerd) (Februaro 16a, 1497 – Aprilo 19a, 1560) estis germana profesoro kaj teologo, gravulo en la Protestanta Reformacio, amiko kaj partnero de Marteno Lutero.

Junaĝo kaj edukado

Melanktono naskiĝis la 16an de februaro de 1497, en Bretten, ĉe Karlsruhe, kie lia patro, Georg Schwarzerd, estis armilisto de la Palaca Grafo Filipo de Palatinato.

En 1507 li estis sendita al la Latina Lernejo de Pforzheim, kies rektoro, Georg Simler de Wimpfen, enkondukis lin al studo de latinaj kaj grekaj poetoj kaj de la filozofio de Aristotelo. Sed influis lin ĉefe lia onklo, Johann Reuchlin, la grava reprezentanto de humanismo, kiu konsilis lin ŝanĝi sian familinomon, *Schwarzerdt* (laŭvorte

Nigra-tero), al la greka ekvivalento *Melanktono* (Μελάγχθων).

Danke al la influo de la onklo, en 1518 akiris la katedron de greka lingvo en la Universitato de Wittenberg. La prelego akceptanta tiun katedron ege allogis la atenton de Marteno Lutero, katedristo de Biblia Teologio en Wittenberg ekde 1512 kaj kiu ludis gravajn rolon kaj influon sur li. Li studis teologion kaj finis en 1519.

Teologo

En 1521 li verkis *Komunaĵoj pri Teologio*, verko favore al la Reformacio, kaj anstataŭis la personon de Lutero kiel estro de tiu movado en Wittenberg, kiam li estis arestita en la kastelo de Wartburg. En 1526 li iĝis katedristo de teologio kaj partoprenis, kun aliaj 27 delegitoj, en la unuigo de la fondo de la reformaciaj eklezioj de Germanio.

Reformatoro

Kiel reprezentanto de la Reformacio antaŭ la Regna parlamento de Aŭgsburgo (urbo de la Sankta Romia Imperio), en 1530 prezentis la verkon *Konfeso de Aŭgsburgo*, 28 fidartikoloj redaktataj kunlabore kun Lutero. La sinteno de tiu



kredo estas tiom reunuiga, ke surprizis eĉ la katolikojn. Post unu jaro li publikis *Apologion*, defende de la Konfeso de Aŭgsburgo, profundigante en kelkaj el ties specifaj aspektoj per *VARIANTOJ* (1540). Pro ties intenco akiri interkonsenton inter protestantoj kaj katolikoj aŭ, almenaŭ, inter la diversaj frakcioj protestantaj, la plej striktaj sekvantoj de luteranismo konsideris liajn opiniojn herezo. Li estis komprenema kun la evangelia doktrino kaj dum tempo konservis la plej parton de la katolika ceremoniaro, ĉar li konsideris ĝin *adiaphora* (de la greka, “banalaĵoj”), malgrava materialo kion pli bone oni toleru. Ĝis sia morto li defendis la reunuigon de la kristanaj eklezioj kaj estas la plej granda ekumena reprezentanto en la reformacia tempo.

Sekvo


Filipo Melanktono iĝis la ĉefa estro de luteranismo post la morto de Marteno Lutero. Sen Melanktono la reformacio ne estas pensebla kaj tio substrekas liajn

meritojn.

Li estis naturdotita persono, universale klerigita kaj lia vivo montris neordinaran supreniĝon. Li staris preskaŭ duon jarcenton en la hela lumo de la germana kaj eŭropa publiko, ankaŭ kiel instiganto sur lerneja kaj universitata kampoj.

Kelkaj artistoj de la epoko portretigis lin: Durero faris gravuraĵon en 1526 kaj Lucas Cranach la Maljuna faris ksilografion en 1561, baze plej verŝajne sur skizo kiun li faris dum lia funebro.

Longe staris la reformatoro Melanktono en la ombro de Lutero. Sed la apudaj tomboj en la palaca preĝejo (Schlosskirche) de Wittenberg atestas jam pri ilia amikeco kaj signifo por la reformacio. En la 19a jarcento oni ankoraŭ timis, ke monumento de Melanktono en Wittenberg povus malgrandigi la famon de Lutero. Sed tio estas pasinteco. Sur la foirejo en Wittenberg ambaŭ monumentoj nun staras egalrangaj kaj konkordaj.



Loci Communes de 1521
[Komunaĵoj pri Teologio]



La domo de Melanktono en Wittenberg

Du grandaj bibliaj tradukprojektoj realiĝis

Gerrit BERVELING , NL

En somero 1988 Gersi Alfredo Bays petis min, tradukinton de *Laŭdo de l' Stulteco* de Erasmo, ke mi bonvolu verki novan tradukon el la origina Greka pri la tuta Nova Testamento. Mi iom skeptike reagis, ke provcele mi komencos per la plej frua evangelio: en 1992 aperis en kvar libretoj *La Bona Mesaĝo de Jesuo: laŭ Marko / laŭ Mateo / laŭ Luko & laŭ Johano*²⁾; ĉi-lasta kune kun *sinopso*. Kiel sciante, la leteroj de Paŭlo estas historie la plej frua parto de l' Nova Testamento. Do, kiam en 2004 aperis *Leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo*¹⁾, ĝi prave portis la subtitolon *La Nova Testamento, vol. 1*. Finfine, en 2010 aperis *Flanke je Jesuo; la Nova Testamento, vol. 3*³⁾ kiu enhavas la librojn Agoj, Al la Hebreoj, Leteroj de Jakobo, Petro, Johano & Judaso, plus la Apokalipso de Johano. Per tio do realiĝis ĉi tiu *unua* granda tradukprojekto.

Intertempe, kaj oni ne forgesu pri la fizikaj laborcirkonstancoj: mi anko-

raŭ ĉiam restis profesie sufiĉe okupita – ĝis 1998 kiel pastoro en pluraj paroĥoj samtempe; depost tiam kiel plenpostena mezlerneja instruisto pri Latina kaj Greka –; intertempe do realiĝis la *dua* biblia tradukprojekto: mi ja konstatis, ke bedaŭrinde mankas en Esperanto ĉio biblia ekster la pure kalvinana kanono. Laŭ peto de KELI kaj IKUE reage al la publikigo de *La Bona Mesaĝo de Jesuo* (nun eblus nomi ilin kune *La Nova Testamento, vol. 2*) mi min do turnis ankaŭ al la tiel nomataj Duakanonaj Libroj. En 2001 aperis du volumoj: *La Duakanonaj Libroj, vol. 1; la historiaj libroj kaj vol. 2; la poeziaj kaj profetaj libroj*. Enestas en ili la fame konataj 1 & 2 Makabeoj, La Saĝeco de Jesuo Siraĥ, k.a. – ĉiuj oficialaj en la Romkatolika Eklezio. En 2003, post ekzamenado pri la traduklaboro fare de fakulo de l' Nederlanda Bibliosocieto, tiuj ĉi duakanonaj libroj aperis bloke en nova eldono de *La Sankta Biblio* fare de British and Foreign Bible Society; kaj en 2006, sub aŭspicioj de IKUE kaj

1) <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?titolo=leteroj+de+paŭlo&aŭtoro=&katego=&kondicho=chio&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo>

2) <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?titolo=Bona+mesaĝo+de+Jesuo&aŭtoro=&katego=&kondicho=chio&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo>

3) <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?titolo=flanke+je+jesuo&aŭtoro=&katego=&kondicho=chio&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo>

KELI ili aperis en la tradiciaj lokoj en nova, pli bele editorita speciala numero de la UEA-serio *Oriento-Okcidento*. Fine en 2008 aperis *La Duakanonaj Libroj, vol. 3; libroj de la Ortodoksiaj Eklezioj*⁴⁾ – tiu ĉi volumo enhavas librojn, kutime troveblajn nur en eldonoj el la Greka kaj Rusa Ortodoksio: ĉefe 3 & 4 Makabeoj, 1 & 4 Ezra. Per tio ĉi do nun kompletas en Esperanto la tuta tekstaro de la Biblia heredaĵo – krom la Etiopia *Henoh* (aŭ *Hanoĥ*).

La vere *apokrifa tekstaro* kompreneble ne estas ĉi tie menciata. Pluraj homoj ja pensas, ke ekzemple *1 Makabeoj* estas apokrifa, sed tio estas miskompreno: vere *apokrifa* estas nur

libroj, kiuj *nenie en la mondo* estas oficialaj eroj de la Biblio. Kaj ankaŭ da tiaj libroj ekzistas tuta serio.

En Esperanto nun pretas la tuta – krom *Henoh* – Biblio. Kiu kapablos traduki tiun lastan libron?



Paĝo de la greka versio de *Henoh*. 4a jc.

⁴⁾ <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?titolo=duakanonaj+libroj&aŭtoro=&katego=&kondicho=chio&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo>

Letero al la redaktoro

Kara redaktoro, vi multe pripensis la partoprenon de eklezianoj de Diservo: *Kial kaj pro kio?*

La grupiĝon mi nur vere spertas dum la Sankta Manĝo, starante ĉirkaŭ la altaro kun aliaj.

Ĉu plaĉi al Dio en la Diservo? Tion mi neniam pripensis. Laŭ mi esence estas, ke Dio servas al mi. Eble mi plaĉas al Dio laŭdante Lin, sed certe pli per agoj en mia ĉiutaga vivo. Mia Diservo komenciĝas per la vojo al la preĝejo sekvante la kantantajn sonorilojn. Plej ofte mi devas iri sola kaj pripensi la

kaŭzojn de miaj mankantaj najbaroj.

Jes, mi renkontas ankaŭ konatulojn kaj ŝatas la interrilaton kun la samkredantoj. Apud la prediko por mi esencaj partoj de la Diservo estas la preĝado (ankaŭ porpetoj), kantado kaj la beno.

Tute mankas en niaj Diservoj la taska grupo por disvastigi la Evangelion. Tio eblas verŝajne nur, se mi benita homo poste estos beno por miaj proksimuloj.

Pli detale mi momente ne povas pritrakti la temon.

Leganto

Kiuj venas per komuna transporto:

De Budapeŝto Nyugati Pályaudvar iras la trajnoj al Nyíregyháza. Plej komforte, se vi elektas IC (InterCity) trajnon, ĉar tiu en ĉiu horo, rekte kaj rapide iras al Nyíregyháza. Vi devas aĉeti ankaŭ sidlokan bileton!

Vi povas ankaŭ surrete aĉeti vian bileton: www.mav-start.hu, kiun paĝon vi povas legi hungare, angle kaj germane (unu bileto kun sidlok-bileto estas 4.900 HUF = forintoj). EU-landanoj, kiuj estas pli ol 65 jaraĵ, devas havi registran bileton, kiu kostas nenion, tamen same devas “aĉeti” ĝin, kiel la normalan bileton. Tiam la sidloka bileto kostas 540 HUF.

En Nyíregyháza apud la trajn-ŝtacio vi trovos la bus-haltejon, kie vi devos serĉi la buson al Beregdaróc, aŭ Beregsurány.

Beregsurány estas la ŝtat-lima vilaĝo inter Hungario kaj Ukraino kaj estas ege proksime, 4-5 km de Beregdaróc. La hotelaj busoj atendas kaj kunportos la gastojn al Beregdaróc, **SE** vi antaŭe petas de mi tiun ĉi servon.

La busan bileton vi devas aĉeti ĉe la ŝoforo de la aŭtobuso (ĉirkaŭ 1.500 HUF). La EU-landanoj, kiuj estas pli ol 65 jaraĵ devas pagi nenion.

Mi serĉis en la trajnaj kaj la busaj horaroj eblecojn, jen kelkaj:

Trajnoj (foriro [F] kaj alveno [A])

Busoj (foriro [F] kaj alveno [A])

↓ Budapest Nyugati	07:23 F	↓ Nyíregyháza	10:35 F
↓ Nyíregyháza	10:24 A	↓ Beregsurány	12:22 A

↓ Budapest Nyugati	09:23 F	↓ Nyíregyháza	13:00 F
↓ Nyíregyháza	12:24 A	↓ Beregdaróc	15:25 A

↓ Budapest Nyugati	10:23 F	↓ Nyíregyháza	13:40 F
↓ Nyíregyháza	13:24 A	↓ Beregsurány	16:20 A

↓ Budapest Nyugati	12:23 F	↓ Nyíregyháza	15:35 F
↓ Nyíregyháza	15:24 A	↓ Beregdaróc	17:51 A

↓ Budapest Nyugati	13:23 F	↓ Nyíregyháza	17:20 F
↓ Nyíregyháza	16:24 A	↓ Beregdaróc	19:45 A

En la regiono ĉiuj konas kaj ŝatas sian belegan novan ripoz-lokon, do se vi diras “Het Čilag” ĉiuj tuj scios, kion vi serĉas kaj ili volonte helpos al vi.

Kiuj venas per aŭto:

De Budapeŝto vi devas elekti la vojon M3 al la direkto Nyíregyháza, kaj ĝis la 234a kilometer-ŝtono vi iru. Tie estas la fino de la aŭto-ŝoseo, kaj vi devas daŭrigi rekten al la direkto Záhony ankoraŭ 6 km-jn, kie estos rond-irejo, kaj vi povos turni vin dekstren al la direkto Vásárosnamény, la numero de la vojo estas 41, kaj vi devas iri 60 kilometrojn, ĝis la 68a km-ŝtono. Sed antaŭe, post la 52a km-ŝtono, en Vásárosnamény vi estu atentemaj, ĉar vi devas forte turni vin dekstren al la direkto Beregsurány.

Post la 68-a km-ŝtono vi devos turni vin maldekstren al Beregdaróc. Oni nur unufoje signas la vilaĝon, tie, kie vi tuj devas turni vin, do denove estu atentemaj.

Post 4 km vi alvenos al la vilaĝo, kaj post ĉirkaŭ 600 metroj maldekstre vi jam ekvidos la turon de la reformita preĝejo, kaj poste estos la unua ebleco turni vin maldekstren, al la strato Alkotmány.


Je la angulo vi jam vidos la ŝildon de nia kongresejo Hét Csillag (diru: het ĉilag), kaj tuj poste vi jam rimarkos la hotelon mem en la maldekstra flanko de la strato, kaj vi povas eniri per aŭto al la ĝardenaj parklokoj.

La GPS-numeroj de Beregdaróc estas: 48.19822° kaj 22.52815°

Mi ankaŭ donas al vi mian mobil-telefonan numeron, por ke vi povu voki min, se vi bezonas helpon: + 36 30 844 9249

Mi multe deziras al vi ĉiuj komfortan kaj belan vojaĝon, sukcesan alvenon kaj amplenan, enhav-riĉan kongresan semajnon.

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS



VÁCLAV LAMR

Biblické obrazy
Výstava od 1.–31. července 2010
Vernisáž ve čtvrtek 1. července v 18 hodin
Otevřeno:
út-pá 11–18 h, so-ne 14–18 h

Biblical paintings
Exhibition 1–31 July 2010
Exhibition opening on Thursday
1 July 2010 at 8:00 p.m.
Opening hours:
Tue–Fri 11–6 p.m., Sat–Sun 2–6 p.m.

www.lamr.estranky.cz

GALERIE PERLA
Jánský vršek 15, Praha 1

Email: galerie.perla@seznam.cz
Telefon: 773 657 033 (Josefa Potlajová)
Web: www.galerieperla.cz

Václav LAMR, la artisto kies ilustraĵojn ni kelkfoje uzis en Dia Regno,

havos ekspozicion pri bibliaj pentraĵoj en julio en Prago. ☞

Laŭ nekonata fonto prilaboris Jacques TUINDER, NL

Antaŭ tre longa tempo vivis en Ruslando tsaro, kiu ĉion ajn posedis kion al si deziri povus homo. Sed li absolute ne sciis kial li vivas kaj kiel li vivu. Kion do la vivo surtera intencis kun li? Tri esencaj demandoj lin de tago al tago turmentis pri tio kion povus doni sencon al lia vivo: “Kion mi faru? Kun kiu? Kiam?”

Konsultinte ĉiujn saĝulojn, ĉiujn klerulojn, li kun ĝojo aŭdis pri simpla kamparano en fora lando, kiu finfine povus doni al li respondon kontentigan.

La tsaro decidis tuj ekvojaĝi. Kaj post multe da semajnoj li atingis la lokon kie loĝas lia esperebla konsilisto. Nu, tiu kamparano apenaŭ atentis la tsaron, kiam li direktis sin al li kun siaj demandoj. Li neniel, eĉ ne per unu vorto, respondis; li nur daŭrigis plugi sian kampon. Forte koleriĝis la tsaro, dirante: “Ĉu vi ne scias, al kiu vi parolas? Mi estas la tsaro de ĉiuj Rusoj.”

Sed eĉ tio tute ne faris impreson al la kamparano, kiu ne interrompis sian

laboron.

Subite anasiris sur la kampon grave vundita viro. Antaŭ la plugilo li falis teren. La kamparano diris al la tsaro: “*Helpu al mi porti ĉi tiun kompatindan viron al mia kabano.*”

“*Mi helpos al vi,*” respondis la tsaro. “*Sed ĉu vi poste tuj respondos al miaj demandoj?*”

“*Certe, poste,*” diris la kamparano, kaj kune ili portis la viron al la kabano kaj bandaĝis liajn vundojn.

“*Ĉu vi do nun diros al mi kion mi demandis?*” ripetis la tsaro.

“*Vi povas iri hejmen,*” konkludis la kamparano, “*vi dume ricevis respondon al viaj demandoj:*

Kion mi faru? – Kion mi renkontas sur mia vojo!

Kun kiu mi faru? – Kun tiuj kiuj troviĝas sur tiu vojo!

Kiam mi faru? – En la tuja momento, kiam la okazo al vi prezentiĝas!”

☞

K

ION MI FARU

KUN KIU

KIAM

?

Ŝercoj kolektitaj (3)

MU Binghua, Ĉinio

- **Post deĵoro la edzo** revenis hejmen kaj vidis slipon sur la tablo, restigitan de lia edzino. Estis legita, ke “Kara, mi iros viziti mian amikinin, por vespermanĝo ni manĝos fiŝojn, kaj malantaŭ la pordo la fiŝkanon vi trovos.”
- **“Hieraŭ mi vidis** vian fianĉinon tre serioze tusi sur homplena strato, tiel ke multaj preterirantoj turnis sian rigardon al ŝi.” “Sed efektive ŝi ne estis en tusado.” “Nu, kial do?” “Ĉar hieraŭ ŝi surhavigis al si tute novan veston de eleganta fasono.”
- **Studento vizitis** kuraciston. Post ekzameno la kuracisto diris al li: “Ne gravas. Unu injekto jam sufiĉas.” Per sorba kotonon frotinte al li brakon, subite la kuracisto, tenante la kotonon proksime de la okuloj, rigardis kaj vidis, kaj refoje frotis la brakon, tiel tri/kvar fojojn. La studento pensis sian malsanon grava kaj maltrankvile demandis: “Sinjoro kuracisto, ĉu la problemo estas granda?” La kuracisto mienis serioze, dirante: “Junulo, vi vere devas bani vin.”
- **“Paĉjo, kia ajn** akcidento surprizus veran viron tiu tute ne estos embarasita, ĉu estas tiel?” la filo demandas sian patron. “Kompreneble, mia infano!” “Do, kion nun mi lasu vin vidi, ĉu mian lernejan enskribaĵon aŭ la novan modaĵon ĵus aĉetitan de panjo?”
- **“Kial viaj haroj** malpliigis tagon post tago?” “Ĉar ĉiutage mi havas ion ĉagrenan.” “Kio estas via ĉiutaga ĉagreno?” “Mi ĉagreniĝas ke miaj haroj malpliigis tagon post tago.”
- **Juĝisto al akuzito:** “Kial vi trompis tiujn, kiuj konfidis al Vi?” La akuzito: “Ĉar mi intencis trompi tiujn personojn malkonfidantajn al mi, sed mi tute ne povis tion plenumi, sinjoro juĝisto.”
- **“Kial vi speciale** pentradas nur pejzaĝpentraĵojn?” “Ĉar ĝis nun neniu arbo plendis al mi, ke mi fuŝpentris ĝian figuron.”

Sekretaria jarraporto 2009 –2010

Raportas Pavel POLNICKÝ, CZ

Karaj gefratoj, la tempo rapide pasas kaj ni baldaŭ denove renkontiĝos dum la KELI kongreso en Hungario. Estas kutimo, ke en la 3-a numero de nia gazeto Vi povas legi sekretarian jarraporton...sed kion mi raportu, se mi dum la jaro ricevas minimume da informoj.

Mi respondas skribajn kaj retajn demandojn kaj prizorgas necesajn taskojn.

Rele mi estas en kontakto kun aliaj estraranoj kaj danke al tiu ebleco ni povas rapide solvi problemojn. Daŭre mi kontrollegas gazeton Dia Regno kaj post ĝia ricevo de la presejo mi dissendas ĝin al legantoj. Mi pli volonte skribus al niaj “abonantoj“, sed bedaŭrinde multaj membroj ne ĝustatempe pagas sian kotizon!!

En mia hejmo estas sufiĉe granda stoko de libreto **Preĝo por ĉiu tago**, kiun mi afable sendos al mendintoj... pere de aĉeto Vi subtenos agadon de **Evidente**.

Post multaj jaroj devas nia estraro decidi pri la fondo de nova landa sekcio, unua en Afriko. Grupo de **togolandaj** protestantaj kristanoj preparis sian Statuton kaj sendis informon pri sia aktivado. Ili organizas ĉiu-dimanĉe esperantan diservon kun la traduko en franca kaj loka lingvoj. Du foje monate okazas esperanto-kurso.

El **Usono** venis informo, ke dum la landa kongreso en ĉefurbo Vaŝingtono okazis (30.5.2010) diservo, kiun gvidis kaj predikis frato Filipo Dorcas. Antaŭ la diservo gvidis lia edzino Beth biblian studadon (paskaj tekstoj). Partoprenis 10 personoj (samtempe okazis katolika meso).

En **Svedio** okazis jarkunveno de KELI-sekcio kadre de la sveda kongreso en Lesjöfors. Diservo okazis en kapelo de loka muzeo kaj gvidis ĝin pastoro Leif Nordenstorm. Partoprenantoj multe kantis kaj aŭskultis solkantadon de fratino Sabina Åradsson. Favore al Evidente ili faris monokolekton.

En presbitera preĝejo en Novjorko, pastro Johnston prelegis pri Esperanto. Nijl Blonštejn (fotis), kiu ne estas kristano, estis la sola esperantisto kiu partoprenis.



Vi pravas, ke ankaŭ en aliaj landoj estas KELI sekcioj kaj grupoj, sed ili

sendis neniun informon kaj pro tio mi ne povas informi Vin... 80



Estraranoj kaj partoprenantoj dum la jarkunveno 2009 en Vroclavo. Fotis Wil van Ganswijk

Tagordo por la jarkunveno de KELI 2010

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de raportoj
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

- (12) *Ĉi-jare finiĝas la deĵorperiodo de Philippe Cousson, Jacques Tuinder, Els van Dijk kaj Samuel Gaillard*
- (13) *Venontjare KELI festos sian 100jariĝon, sed venis ĝis nun neniun propono por la kongreso 2011 !!!!*

Financa raporto de KELI 2009 (Ĉiuj sumoj en EUR)

		Bilancoj fine de la jaroj	
		2008	2009
Aktivoj	PB-Ĝiro (PB = Postbank NL)	1.303,90	1.756,06
	PB-Rentemeer rekening (2,7%)	33.266,12	34.168,18
	UEA-konto kelk-p	711,95	1.458,50
	Kasista kaso	9,16	0,00
	Pavel Polnický, CZ	<u>1.112,00</u>	<u>410,00</u>
	<i>Monrimedoj</i>	36.403,13	37.792,74
	Postulo el librovendado (Biblio)	<u>401,47</u>	<u>122,20</u>
	<i>Postuloj</i>	401,47	122,20
	Stokoj (libroj)	5.829,50	5.604,10
	E-Misio, Kasedoj D.K.	<u>116,00</u>	<u>116,00</u>
<i>Provizo</i>	5945,50	5.720,10	
Transitaĵoj	0,00	0,00	
Aktivoj sume	42.750,10	43.635,04	
Pasivoj	Kapitalo	8.521,14	9.172,34
	Saldoj negativa/pozitiva	651,20	721,33
	<i>Kapitalo entute</i>	9.172,34	9.893,67
	Dumvivaj membroj	2.382,43	2.327,64
	E-Misio	6.802,91	6.794,51
	Helpa kaso	2.559,97	2.523,15
	Junulara helpa kaso	337,45	337,45
	Kongresa rezerva kaso	1.761,48	1.449,48
	Literatura/Himnara kaso	13.058,57	13.058,57
	Informada/Varbada kaso	149,72	149,72
	Legaco C.P.W.	2.268,90	2.268,90
	Legaco E.t.O.-W.	2.268,90	2.268,90
	Legaco Boven	<u>1.865,00</u>	<u>1.865,00</u>
	<i>Fondusoj entute</i>	33.455,33	33.043,32
	Pasivoj	0,00	410,80
	Kreditoroj	95,25	95,25
	Transitaĵoj	<u>27,18</u>	<u>192,00</u>
	<i>Pasivoj</i>	122,43	698,05
	Pasivoj sume	42.750,10	43.635,04

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2009-12-31

Aktivoj

Pavel Polnicky: Li gvidas kason por pagi la presadon kaj sendadon de DR el CZ

Stokoj: Biblio 2003 (44), Biblio 2006 (629), Novaj Testamentoj broŝ. (30), Novaj Testamentoj bind. (36), Evangelioj laŭ Johano (33), Adoru Kantante (9), Esperante kaj Ekumene (2), Adoru (15). La libroj estas parte stokataj ĉe Els van Dijk(NL) kaj Jacques Tuinder(NL), Bengt Olof Åradsson(SE), Siegfried Krüger(DE), Eva Farkas(HU), Karl Heinz Schaeffer(DE). La plej grandan parton de la Bibliojoj stokas por ni Bernhard Eichkorn (DE)

E-Misio kasedoj: Dimanĉa koncerto (40) La vendontoj estas petataj kontakti la kasiston.

Postulo el librovendado:

Bernhard Eichkorn (IKUE) kaj KELI financis 2006 la noveldonon de la Biblio. Kvanto 4000 ekzempleroj, 1000 financis KELI (1000 x 7,63 = 7630 EUR). Je la fino de la jaro estis venditaj 39 ekzempleroj. Laŭ interkonsento Bernhard Eichkorn stokas la Bibliojn kaj la profito estas dividita 3:1. El tio rezultas la postulo de 122,20 EUR, kiu jam estas pagita.

Pasivoj

Kapitalo: Estas la libera kapitalo, alian vidu sub Fondusoj

Saldo pozitiva: 721,33 EUR

Fondusoj Helpa kaso: Estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson.

Ni subtenis kelkajn personojn.

E-Miisio: la kaso estas restaĵo el iama sveda agado. Vera misio ne okazis, estas nur monelspezoj misicele. KELI-membroj donacis pere de la kasisto 2009 al Evidente 240 EUR

Kreditoroj: Brita kaso 95,25 EUR (Jean Bisset)

Pasivoj: Evidente: 16,80 EUR, redaktoraj kostoj 2009: 250 EUR

Transitaĵoj: Antaŭricevitaj kotizoj 2009: 192,00 EUR

La bilanca sumo grandiĝis je 884,94 EUR.

Rezulto 2009 kaj buĝetoj 2009, 2010 kaj 2011 (Ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2009	Rezulto 2009	Buĝeto 2010	Buĝeto 2011
Elspezoj				
Presisto kaj sendado de DR	3.000	2.854,00	2.900	3.000
Perantoj	20	0,00	20	20
<i>Revuokostoj</i>	<i>3.020</i>	<i>2.854,00</i>	<i>2.920</i>	<i>3.020</i>
Prezidanto	30	0,00	30	30
Sekretario	80	60,00	60	60
Redaktoro	250	250,00	250	250
Kasisto/Matrikulisto	40	19,41	30	40
<i>Estrarkostoj</i>	<i>400</i>	<i>329,41</i>	<i>370</i>	<i>380</i>
UEA-kotizo	60	59,00	60	60
Ĉambro de Komerco	30	37,14	40	40
Kaskontrolo	60	71,75	75	75
Bankkostoj	80	31,64	35	40
Merituloj	30	0,00	30	30
UK Lukostoj	(70)	-45,00	40	70
<i>Ĝeneralaj kostoj</i>	<i>260</i>	<i>154,53</i>	<i>280</i>	<i>315</i>
Librovendado (kostoj)	250	285,40	125	115
Varbado (Inf./varba kaso)	20	0,00	20	20
Rabatoj de Perantoj	20	14,60	15	15
<i>Aliaj elspezoj</i>	<i>290</i>	<i>300,00</i>	<i>160</i>	<i>150</i>
Elspezoj entute	3.970	3.637,94	3.730	3.865
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.700	2.532,27	2.600	2.500
Kotiz- kaj kursdiferencoj	10	0,00	10	10
Adopta Kaso	450	774,07	500	500
<i>Kotizoj entute</i>	<i>3.160</i>	<i>3.306,34</i>	<i>3.110</i>	<i>3.010</i>
Librovendado	400	215,20	215	200
Rentumoj	800	837,73	800	800
Profito el kongreso	0	0,00	300	0
<i>Aliaj enspezoj</i>	<i>1.200</i>	<i>1.052,93</i>	<i>1.315</i>	<i>1.000</i>
Enspezoj entute	4.360	4.359,27	4.425	4.010
Saldoj	390	721,33	695	145

Klarigoj pri la rezulto 2009 kaj la buĝetoj 2010/2011

Kotizoj pagendaj de		
Membroj individuaj	126 (143)	Nuraj abonantoj ... 22 (23)
Membroj familianaj	7 (8)	<u>IKUE-abonantoj ... 25 (26)</u>
Membroj subtenantaj	5 (4)	47 (49)
Membroj dumvivaj	19 (19)	
<u>Membroj adoptitaj</u>	<u>125 (131)</u>	
	282 (305)	(antaŭa jaro inter krampoj)

La membraro reduktiĝis. Pasintecce nepago ne tuj signifis ekŝigon,. De post 2009 ni nun konsekvence agas kaj forigas nepagantajn membrojn.

Librovendado: La kostoj aŭ enspezoj pro librovendado influas la saldon.

Adopta Kaso: Mono donacita de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Estas membroj en Albanio, Afriko, Bulgario, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Hungario, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio. Ili estas petataj kontribui “laŭforte” (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto). Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacintoj.

Kotizoj hungaraj 60, ĉeĥaj 120, rumanaj 100 EŬR

Donacoj de KELI-sekcioj: finna 120, brita 60, nederlanda 200. Unuopaj membroj entute 114,07

En 2009 enfluis 774,07 EUR

En Hungario kaj Rumanio intertempe kreskas la nombro de plene pagantaj membroj.

Saldoj 2009, 2010 kaj 2011: La financa bazo de KELI estas ankoraŭ kontentiga.

Heilbronn, 2010-03-10

Siegfried KRÜGER, kasisto

Pri Dia Regno laŭ Sankta Luko 14

13 Sed kiam vi faras festenon, invitu malriĉulojn, kriplulojn, lamulojn, blindulojn; 14 kaj vi estos feliĉa, ĉar ili ne povas rekompenci vin, sed vi rekompenciĝos en la releviĝo de la justuloj. 15 Kaj aŭdinte tion, unu el la kunsidantoj diris al li: Feliĉa estas tiu, kiu manĝos panon en la regno de Dio.


Mi ŝatas simbolojn kaj speciale plaĉas al mi la KELI-insigno. Joel Amis, nia iama usona reprezentanto, uzis ĝin sendante leterojn kaj instigis min ankaŭ uzi ĝin kaj nun mi posedas stampilon. Mi ankaŭ memoras, ke kelkaj el niaj virinaj membroj dum niaj kongresoj portis ĝin kiel ornamaĵon, kiu pendas je ĉeneto sur la brusto.

Temas pri la Hugenota Kruco kompletigita per la stelo kaj cirklo. Antaŭ kelkaj jaroj ni ja kongresis en Nantes, sed neniu parolis pri tiu kruco, kiu unue estis simbolo por la francaj reformitaj kristanoj kaj nun validas por ĉiuj protestantoj.

Kie estas la origino? Legendo raportas, ke kelkajn jarojn post la nuligo de la edikto de Nantes junaj francaj pastoroj, kiuj ĵus finis la studadon en la franca Svisio, proksime de Lyon estis arestitaj kaj longe pridemanditaj. Ĉar ili ne malkonfesis sian kredon, oni kondamnis ilin kaj mortigis ilin sur brulŝtiparo. Katolika artisto, kiu ĉeestis la ekzekuton, admiris la kuraĝon de la junaj viroj. Li provis kompreni ilin kaj – gajnita por la reformacio – li rakontis al multaj homoj, kion li perceptis en Lyon. Li ankoraŭ aldonis, ke li estis vidinta en la mezo de la kvar brulŝtiparoj kvinan fajron, kiu pli hele flamegis. En

ĉi tiu kvina fajro li rimarkis la ĉeeston de Kristo mem, kiu alportis al la ĝismorte fidelaj kristanoj la martiran kronon. Tiu artisto, memorante la okazaĵon, laŭdire kreis la Hugenotan Krucon. Li elpensis kvar duoblajn flamojn, kiuj eliras krucforme centron kaj kiuj je la ekstremaĵoj sin fendas. Ligitaj estas la flamoj per krono. Ĉu

estas li, kiu aldonis en la malsupra parto larmon (simbolo pri la suferoj de la reformitoj) aŭ kolombon (simbolo de la Sankta Spirito)? La legendo ne raportas pri tio. La KELI-anoj preferis la insignon kun kolombo, kiu laŭ Antoine Court (refondis la reformitan



eklezion de Francio post la nuligo de la edikto de Nantes en la jaro 1685) ankaŭ simbolas la “*eklezion en la dezerto*” laŭ la biblia teksto el la Alta Kanto 2, 14: “*Ho mia kolombino, en la krevajoj de la roko, en la kaŝejo de la rokkrutaĵo...*”

La emblemon desegnis Dirk de Boer el Nederlando, kiu estis la unua post-milita sekretario de KELI kaj rekonstruis la organizaĵon post 1945. Ĉu nia insigno malhelpas la ekumenon? Ekumeno ja ne signifas perdi la identecon kaj ni ne forgesu la mesaĝon de la martiroj. Gvidu nin la Sankta Spirito, kiun simbolas la kolombo, al unueco malgraŭ rita divers-eco. ∞



Rients Peter Espero Koopmans

La 2-an de aprilo 2010 forpasis neatendite en Hago, **Rients Peter Espero Koopmans** en la aĝo de 52 jaroj. Li estis la filo de Wim kaj Jelly Koopmans. Pluraj el la malnovaj membroj certe rememoras lin kaj la gepatrojn. La tri knabinoj kaj la filo partoprenis en sia infanaĝo KELI-kongresojn. Mi ofte renkontis lin en la gepatra domo en Leiden kie mi ricevis Esperanto-instruadon.

La teksto sur la funebra sciigo estis el 1 Korintanoj 13: *”Restas nun fido, espero, amo, tiuj tri; kaj la plej granda el ili estas amo.”*

La funebra diservo okazis en la preĝejo en Hago en kiu li estis libervola helpanto kaj ekleziano. Ĉeestis multaj kolegoj, amikoj kaj konatoj.

Ni sincere kondolencas la tri fratinojn kaj aliajn parencojn.

Johannes Unico Hommes

La 11-an de februaro 2010 forpasis nia maljuna membro **Johannes Unico Hommes**. La Biblia teksto sur la funebra sciigo estis el Johano 11:25: *“Kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos”*.

S-ro Hommes naskiĝis la 17-an de novembro 1908 en Winschoten (Frislando). Kiel junulo li lernis en 1920 Esperanton kun sia patro. Dum multaj jaroj li aktivis en KUNE kaj KELI kaj li agadis por nia misia fako. Ĝis la morto li ankaŭ estis membro-delegito de UEA.

Ni sincere kondolencas la infanojn kaj parencojn.

Els van Dijk

Patrino Dio



Ref: Ki - el kun te - ner' al si - aj van-goj



si - an be - bon le - vas la pa - trin',



ti - el sa - me kun pa - tri - na a - mo



zor - ge te - nas ni - a Di - o nin.



1. Li nu - tras la bir - dojn, ves - tas la li - li - ojn,

2. Ne - ni - u pa - se - ro fa - las sur la te - ron

3. Li aù - das la ĝe - mojn, eĉ la ne - di - reb - lajn,



ne - ston por la i - doj tro - vas la hi - rund'.

sen la vol' de Di - o. Pli va - lo - ras ni.

ko - nas ni - ajn pen - sojn an - taù ol ni mem.



Kon - traù la lu - po ŝir - mas Li la si - ajn,

Sur ni - a ka - po ĉi - uj ni - aj ha - roj

Li nin pro - tek - tas, ta - ge do - nas om - bron,



gvi - das si - ajn ŝa - fojn paŝ - ten al la font'.

es - tas kal - ku - li - taj de la bo - na Di'.

gar - das nin dum - nok - te, vig - la, sen dorm - em'.

M (Sehnsucht – das Lied der Taiga): Rudi Bauer • kantita de Alexandra 1968 •
© controll

Vidu ekzemple: http://www.youtube.com/watch?v=_NB448iZxvM

E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2010-06-03

Komparu: Hoŝ 11, 4 (EÜ) • Mat 6, 26 - 29 • Joh 10, 11 ss • Psa 23, 2 • Mat 10,
29 - 31 • Rom 8, 26 • Psa 139, 2 - 4 • Psa 121